

Eŭropa Bulteno

Junio 2008, № 6 (71)

De la redakcio...

Karaj legantoj,

Ferioj fine... Nu, eble ne por ĉiuj tuj, sed atendas nin du monatoj, la plej riĉaj de vojaĝoj kaj esperanto-aranĝoj. Eblecoj estis abundaj kaj mi esperas ke ĉiuj trovis ion por si mem, kaj ke vi en la somero ĝuos aparte belan kaj amikan etoson kie ajn vi pasigos vian librempon. Sed ne forgesu skribi al ni pri viaj belaj feriaj tagoj. Ni kun plezuro aperigos viajn artikolojn. Sekva numero aperos aŭguste.

Fartu bone kaj ĝuu la someron,

**Agrablan legadon,
Vesna Obradović**



HONORAJ MEMBROJ DE EEŬ



Margareta Handzlik

EEŬ decidis ĉi-jare proklami du honorajn membrojn de EEŬ: Margareta Handzlik kaj Ljudmila Novak por esceptaj meritoj por Esperanto en Eŭropo. La specialajn medalojn kaj diplomojn EEŬ oficiale transdonos al la meritaj personoj dum la UK en Roterdamo. La du parlamentanoj tre aktive engaĝis sin por Esperanto en Eŭropa Parlamento. Margareta Handzlik iniciatis plurajn gravajn interparolojn kaj dissendis komunajn leterojn kun UEA kaj



Ljudmila Novak

EEŬ prezidantoj al ĉiuj parlamentanoj invitante ilin al pluraj gravaj aranĝoj de esperantistoj. Ŝi ankaŭ partoprenis en diversaj E-aranĝoj kaj akceptis E-delegaciojn. Ljudmila Novak partoprenis en la Konferenco pri Interkultura Dialogo, organizis priesperantan ekspozicion en la Eŭropa Parlamento. Ambaŭ aktive subtenis starigon de interparlamentara grupo por Esperanto kiun gvidos sinjoro Geremek.

Zlatko Tišljarić

BONVENON AL LA VIKIPEDIO EN ESPERANTO!

Vikipedio estas projekto por la konstruo de libera reta enciklopedio en multaj lingvoj. Ĉiu povas kontribui per sia scio. Ekde novembro 2001 tiel estiĝis 100 695 artikoloj en la esperantlingva versio.

La 16-a de junio 2008, Vikipedio en Esperanto atingis 100 000-a artikolon, kaj iĝis 20-a lingvo kiu trapasis la limon. La 100.000-a artikolo estas pri monfalsado. Ĝin vi povas legi ĉe: <http://eo.wikipedia.org/wiki/Monfalsado>

Ĉiuj — inkluzive de ĉiu leganto — povas redakti ĉiun artikolon, korekti lingvajn erarojn, pligrandigi artikolojn, skribeti, aŭ skribegi. La oftaj demandoj klarigas kiel redakti paĝon kaj aliaĵojn. En la paĝo lastaj ŝanĝoj aperas ĉiuj ŝanĝoj. Ĉiu povas kontribui libere, ĉar Vikipedio estas komunuma projekto, ne finita verko, kaj ĝi senĉese ŝanĝiĝas. Se vi ŝatas kunlabori pri iu certa temo, superrigardu nian portalejon, kie estas listitaj ĉiuj temaj portaloj. Tiuj, kiuj taksas Vikipedion altkvalita malgraŭ ĝia libera redaktado, skribis respondojn al kritikoj.

Kontribuu ankaŭ vi, skribu pri viaj ŝatataj temoj aŭ pri fakaj okupoj.

Kune ni povas fari pli.

Via Vikipedio

LA 8-a KONGRESO DE EŬROPA ESPERANTO-UNIO EN ESPERANTO-URBO



Kiel ja scias ĉiuj esperantistoj, ekzistas en meza Germanio en la montaro Harz urbeto Herzberg, kiun la urbestro oficiale proklamis Esperanto-Urbo dank'al escepte grava kaj tradicia agado de esperantistoj en tiu urbo. Dum jardekoj tie vivis sinjoro Giesner, kiu estris Fervojistan E-movadon kaj ligis la lokajn fervojojn kun multaj E-aktivadoj. Poste sinjoro Petro Zilvar fondis Esperanto-centron kaj disponigis sian domon por tiu centro. La nuna urbestro volis subteni tiun agadon kaj komprenis ke la malgranda urbo (15.000 loĝantoj) povus havi utilon aŭ almenaŭ famon pro tio kaj konvinkis la urbestron fari

tiun paŝon: proklami la urbon Esperanto urbo. La esperantistoj subtenitaj de Zsofia Korody el Hungario diligente laboregis por montri al la urbo ke ili estas por ĝi utilaj. Nun en la urbo daŭre okazas seminarioj kaj internaciaj aranĝoj, en ĉiuj lernejoj okaza E-kursoj, estas organizataj interŝanĝoj de instruistoj, gelernantoj kaj aliaj fakuloj inter la urbo kun sia ĝemelurbo Gora en Pollando per Esperanto ktp. En la urbo troviĝas krom la E-centro kun biblioteko, arkivejo ktp ankaŭ pluraj eksteraj signoj ke temas pri aparta urbo: estas tabuloj diversloke dulingvaj (en Esperanto kaj la germana), eĉ trafiksignoj.

Por subteni tiun apartan fenomenon en la mondo la estraro de EEŬ decidis havi sian 8-an kongreson en Herzberg. Ĝi okazos samtempe kun la kongreso de Germana E-Asocio (komenciĝos unu tagon pli frue) kaj sekve oni atendas grandan kvanton da germanaj partoprenantoj, sed ni invitas ĉiujn eŭropajn esperantistojn kiujn interesas la plua evoluo de la movado en Eŭropo aliĝi kaj kontribui al la kongresa laboro. Interese estas ke la urbeto ne havas sufiĉe multajn kapacitojn en siaj hoteloj por kongreso kun plurcent personoj kaj tial unike ni havos la eblecon loĝi ĉe privatuloj kiuj disponigos ĉambrojn por la kongresanoj. Tial nia partopreno tie signifos plian puŝon por la planoj de la Esperanto-urbo. Tre verŝajne multaj el la ĉambroludonantoj lernos Esperanton por povi komuniki kun la gastoj.

La kongreso okazos Pentekoste inter la 28-a de majo kaj 1-a de junio 2009 kaj la ĉeftemo estas: »Signifo kaj atingoj de novinventemo en neteknikaj sciencoj« (kiel sociologio, psikologio, filozofio, lingvistiko...).

La programo antaŭvidas konferencprelegojn pri la ĉeftemo, aliajn intersajn prelegojn, kulturalan programon, ekskurson al la ĉirkaŭaĵo, viziton al diversaj E-objektoj kaj al la urba kastelo...

Eŭropa Esperanto-Unio havos kunvenojn de la amplekso kaj de la tuta kongresanaro pri la laborplanoj kaj strategio de esperantistaro en EŬ, aparte grava pro tio ke finiĝas la tre fruktodona periodo kiam en EŬ-parlamento membris eĉ du esperantistoj, kiuj verŝajne mem venos al la kongreso.

BONVENON EN ESPERANTO-URBO EN MAJO 2009.

Zlatko Tišljarić

OFICEJO DE LA SLOVENA REGISTRARO PRI INFORMADO KUNVOKIS KUNVENON DE NROOJ – EEŬ-EGALRAJTA PARTNERO



La 23-an de junio 2008 okazis kunveno de neregistaraj organizoj en kiu oni traktis la konkludojn de la fina kunveno de Eŭropa Konsilio (renkontiĝo de eŭropaj ŝtatprezidantoj kaj registarprezidantoj) en la mandato kiam prezidas Slovenio. La kunveno okazis en Ljubljana. Partoprenis reprezentantoj de trideko da NROj kaj enkonduke prezentis la konkludojn kaj la laboron de la Eŭropa Konsilio Bogdan Benko el Ministerio pri eksteraj rilatoj, Anže Logar, direktoro de la kunvokanta organizo (registara

ofico por informado), Mihela Zupanič, el la reprezentejo de Eŭropa Komisiono en Slovenio kaj Nataša Goršek Mencin, estro de Informoficejo de Eŭropa Parlamento por Slovenio. Oni traktis ĉefe la konkludojn pri helpo kiun EŬ antaŭvidas sendi al malriĉaj landoj planante ĝis 2015 altigi la mezan pagon el la landaj budĝetoj al 0,70 %. (Ekz. la nuna pagado fare de Slovenio por tiu celo estas 0,12%). Oni ankaŭ diskutis pri la konsekvencoj de la malakcepto de la Lisbona Kontrakto fare de Irlando. Interalie estis prezentita stranga fakto ke la Slovena Parlamento ratifis la Lisbonan Kontrakton baze de teksto nur en la grandaj lingvoj, sen havi slovenlingvan tradukon!

Mi mem informis la kunvenantojn pri la agado de EEŬ, pri aperigado de la monata bulteno pri Slovena prezidado kaj pere de ĝi pri retradukado al pluraj lingvoj kaj demandis pri kio Slovenio nun fine de sia mandato prezidi al Konsilio de EŬ povas esti fiera kaj kio estas la plej gravaj atingoj por Slovenio. Sinjoro Logar respondis: Slovenio komencis prepari sin por eniri EŬ-on antaŭ dek jaroj, antaŭ 4 jaroj ĝi fariĝis membro de EŬ kaj post tiel mallonga tempo la du-miliona popolo sukcese gvidas la gigantan EŬon. Tio per si mem estas ege grava atingo. Due: ni sukcesis dum tre mallonga tempo eduki milojn da fakuloj por diversaj funkcioj en politiko, ekonomio, lingvaj aferoj kaj tre diversaj aspektoj de Eŭropa Administrado. Tiu personaro estos estonte tre utila por Slovenio rilate komunajn eŭropajn aferojn.



Sinjinoro Goršek Mencin aldonis: Nuntempe estas tre bele esti sloveno en EŬ, ĉiuj nin laŭdas pro bona organizo kaj nun ne plu estas homoj kiuj miksas inter Slovenio kaj Slovakio.

La fakto ke ni prezentiĝis kiel neregistara organizo kiu faris ion utilan, kion neniu alia faris (disvastigis la informojn en pluraj lingvoj helpe de Esperanto) faris nin partnero kiun oni ne mokas pro »artefarita lingvo« sed simple traktas kiel egalrajtan faktoron. Mi tre esperas ke same faros niaj francaj amikoj dum la sekvaj 6 monatoj kiam prezidos Francio.

Zlatko Tišljar

LA TRAJNO ZAMENHOF STARTIS LA VOJON...



Dank' al la afabla helpo de la Direkcio de Regiona Trajna Kampanio en Bjalistoko, laŭ la propono de la Urbestro de Bjalistoko, en la somera horaro ekestis la trajno ZAMENHOF.

La 1-an de junio 2008 ĝi startis la unuan fojon longan vojon de Bjalistoko al Bielsko-Biała kaj pasis la distancon de 544 kilometroj dum 7 horoj 48 minutoj.

Sur la kajo, apud la trajno, okazis solena adiaŭo de la trajno kaj de Ludoviko kaj Klara Zamenhof, kiuj kuraccele forvojaĝis „al akvoj”.



Survoje, ĉe la stacidomo de Varsovio kaj Katowice salutis la familion Zamenhof esperantistoj atendantaj sur kajoj. Surloke, en Bielsko-Biała, gesinjoroj Zamenhof renkontiĝis kun la honora komitato, kiu sub la gvido de eŭroparlamentanino Margareta Handzlik atendas ilian alvenon. Posttagmeze ĉiuj partoprenis la feston okaze de Internacia Tago de Infano, reklamis Esperanton kaj la naskiĝurbon de Ludoviko Zamenhof. Pri la vestaĵo el la epoko por la fam. Zamenhof zorgis la Dramteatro en Bjalistoko. En la trajno estis disdonitaj flugfolioj pri Esperanto kaj Bjalistoko. La evento okazis sub la media protekto de la TV Bialystok kaj la televidkanalo TVN.



Bjalistoka Esperanto-societo



OKAZOS EN ITALIO



De ĵaŭdo la 18-an de septembro ĝis merkredo la 24-an okazos en Italujo nova junulara aranĝo, iom malsimila de la ĝisnunaj. Ĝia nomo estas la Semajno de Kulturo Internacia (SKI), sed ĝi ne okazos sur neĝo...

Sinteze, urbestroj de 6 urbetoj proksimaj al Pisa (San Giuliano Terme, Cascina, Vecchiamo, Calci, Vicopisano, Buti) invitas 25 junajn esperantistojn ne-italajn kaj 10 italajn dum unu semajno en siaj urboj por prezenti siajn kulturojn kaj Esperanton al la lokaj mezgradaj studentoj kaj al la loka junularo ĝenerale.

Ili pagos ĉion surloke (de alveno ĝis foriro: manĝoj, dormoj, moviĝoj), interŝanĝe de tiu "kultura laboro".

Sekve, ni ne petas "aliĝojn" (vi devos pagi nenion al ni, nur zorgi alveni ĝustatempe...) sed "kandidatiĝojn" - ĉar nia respondec (de Itala Esperantista Junularo) estas provizi kiel eble plej "varia" kaj "kvalita" partoprenantaro, ankaŭ ĉar aliaj urbestroj italaj jam enviciĝis por ripeti la eksperimenton estonte. Inter la kandidatoj ni rapide elektos la partoprenontojn.

Pliajn informojn vi trovos, post kelkaj tagoj, en la retpaĝo <http://ski.esperantoitalia.it>

Massimo Ripani

Oficiala organo de Eŭropa Esperanto-Unio.

Finredaktita: la 30-an de junio 2008.

Redaktorino: Vesna Obradović.

En la numero kunlaboris: Zlatko Tišljarić, Massimo Ripani, Bjelostoka Esperanto-societo, Vikipedio kaj Vesna Obradović

Kontakto: vesna.obradovic@gmail.com

Retpaĝo: <http://www.lingvo.org>, www.euroipo.eu